

Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Kiel mi fariĝis esperantisto

Organizanto: Milan Kolka

Rakontado de klubanoj, kiel ni fariĝis esperantistoj. Bonvolu prepari viajn rakontojn. Ne timu. Ĉiu vojo al Esperanto estas interesa. Kelkaj el vi jam pri tio kelkfoje rakontis. Ne hezitu kaj rakontu denove. La renkontiĝo estos registrata. Tial viaj rakontoj estos konservitaj por venontaj generacioj. Mi petas, ke rakontantoj skribu al mi, ke ili volas kontribui.

La renkontiĝo okazos kiel nia kontribuo al Zamenhofa tago.

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 15-an de Decembro 2020 je la 18-a h.

Kie: La renkontiĝo okazos rete per programo Skype (Skajpo). Se vi ankoraŭ ne havas ĝin, mi petas vin instali ĝin. Oni povas elŝuti la programon el retejo <https://www.skype.com/cs/get-skype/>. Vi povas uzi ĝin per komputilo, tabletkomputilo kaj saĝpoŝtelefono (Android kaj iPhone). La sistemo funkcias ankaŭ per retumilo (Edge kaj Chrome), sed ni rekomendas uzi programon.

Ni rekomendas, ke vi uzu aŭskultilojn kun mikrofono por preventi eĥon. Sed ne estas bezonata, vi povas uzi mikrofonon en via portebla komputilo (notebook).

Mi sendos ligilon por la renkontiĝo per retpoŝto marde.

Ĉar la renkontiĝo okazos rete, povas veni ankaŭ esperantistoj el fremdaj landoj. Ni vidos.



Nia programo en Januaro

La 5-an Kristnaskaj impresoj (memorojn de klubanoj)

La 12-an Kiel traduki – Josef Vondroušek (sonregistraĵo)

Cetera januara programo ne estas ankoraŭ fiksita. Mi petas vin, ke vi sendu al mi viajn proponojn de programo. Verŝajne niaj renkontiĝoj okazos ankoraŭ rete



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem [kanálu na Youtube](https://www.youtube.com/channel/UCQLClochDdrb9TaHggRM5cA) (<https://www.youtube.com/channel/UCQLClochDdrb9TaHggRM5cA>).

Milan Kolka
vicprezidanto

